
Filipina Esperantisto



Organ of the Philippines
Esperanto Association

VOL. II., No. 8 APRIL, 1909



Digitized by Google



The Smile of Satisfaction

on the face of
every smoker
who lights a
"JOSE RIZAL" CIGAR
continues until the stub
is tossed away. Reason:
Every cigar is the same
cool, refreshing smoke
from start to finish.

INSIST ON GETTING A

José Rizal

Remember the money is
yours and that dealers
seldom offer a substitute
or "something just as
good" for your benefit.
This cigar is sold by
all live dealers who
cater to the wants of
their customers

Walter E. Olsen & Co.

TWO STORES:

Kiosko Habanero
27 Escolta

Kiosko Rizal
168-170 Escolta

AT ONE PLACE

IN MANILA YOU CAN GET SHIRTS AND UNDERWEAR MADE TO ORDER BY EXPERIENCED CUTTERS WHO ARE EXCLUSIVELY DEVOTED TO THIS LINE; ALL ARTICLES WILL BEAR THIS MARK

MANILA SHIRT FACTORY
MANILA

WHICH IS A GUARANTEE OF FIT, WORKMANSHIP, QUALITY AND COMFORT

127 ESCOLTA
Moderate prices

Fresh Films,

Plates and Paper

Illustrated
Postcards

KODAKS AND CAMERAS

DEVELOPING AND PRINTING

PHOTO SUPPLY CO.
145-147 ESCOLTA
MANILA

Digitized by Google

Filipina Esperantisto

Organ of the Philippines Esperanto Association

P. O. Box 326, Manila, Filipina Insularo

AN ESPERANTIST'S IMPRESSIONS OF DRESDEN

PART II.


By Charles S. Banks.

It is very doubtful if a more motley, a more cosmopolitan, a more fraternizing crowd has ever been brought together to enjoy an excursion. Three of the Elbe river boats had been chartered for the purpose of conveying the merry party to Rathen whence we were to go overland to the Bastei and down to Wehlen where an elaborate *festeno* had been planned, but it was found that four boats were necessary. Each boat held upwards of 450 passengers, so some idea may be gained of the crowd that disembarked at the little Elbe towns of Rathen and Wehlen.

From Dresden to Rathen, a distance of 30 kilometers, our trip in our gaily decorated vessel was one grand ovation. Day fireworks, bombs, cannons and even bonfires were called into requisition to sound forth a note of welcome to the Esperantists.

We left Dresden at 9:30 and reached Rathen at 12:30. Various refreshments were to be had on the steamer. Our steamer was the "Auguste Victoria" and among its passengers were Gen. Sébert, the poet Grabowski, the delegate from Roumania and president of the Roumania Esperanto Association (S-ro Fischer,) the president of the Swiss Association (Rev. S-ro Schneeberger,) S-ro H. Bolingbroke Mudie (one of the prime moving spirits of *Esperantujo*) and many other notables. Dr. Zamenhof was on one of the boats which stopped at Wehlen.

We literally besieged the small but comfortable *Gasthaus* at Rathen and our



Digitized by Google

hungry legions soon depleted its hospitably prepared larders.

Then for a trip up the Bastei among the quaint houses and châlets over the winding roads and along the picturesque by-paths to the heights where the natural store bridge and the ramparts thrown up by nature defy the onslaughts of time and lend great beauty to the landscape.

I know of no scenery with which the beautiful palisades of the Elbe may be compared except those other beautiful "Palisades" of the Hudson river in New York state.

The supply of "Bastei" souvenirs ran out early on the day when the Esperanto *Kongresanoj* visited Rathen and Wehlen.

It was half past eight o'clock in the evening when the *Kongresanoj* embarked at Wehlen after a most jolly *foriro* in the market place and a speech by the mayor of the town followed by a torchlight procession which ended at the quay. Enthusiasm was surely at its highest pitch. Greek fire, Roman candles and Saxon cheers burst forth on every side and the river was brightly illuminated on both shores. This was but the beginning of a display of fireworks that was to last during the three hours of our return to Dresden and surely there has never been a more beautiful sight on land or sea than that triumphal return to Dresden that night. The scene, which must surely live always in the hearts of those who witnessed it, beggars description. It was beautiful because it was simple; it was beautiful because it was sympathetic.

A tired but happy company reached Dresden late that night, a company the members of which had learned to know somewhat of the feelings and sentiments of each other, better than by formal sessions of a congress.

My wife and I met many pleasant people whose kind words and kind faces will live long in our hearts.

It was on this evening that Grabowski gave me autograph copies of some of his most charming bits of poetry penned in *nia kara lingvo.*

The day after the trip to Rathen was given to a general session of the Congress in the morning and special sessions of affiliated groups, including the Internacia Scienca groupo in the afternoon. It was in the morning session of this day that I first met our *majstro*, Dr. Zamenhof, and was given an opportunity to greet the Congress in the name of the "Philippines Esperanto Association." The very warm applause which welcomed my few remarks gave ample evidence of the fraternal feeling which existed for our faraway workers here in the Philippines.

In the evening at the "Vereinshaus" which had been specially set apart by the city of Dresden and beautifully decorated for the occasion, there was given to the Esperantists a treat in the shape of a concert by the Orchestra of the Royal Opera House of Dresden. This rare musical feast was followed by an international dress ball in which the formal evening dress of Americans was in strikingly sober contrast to the gay dress of Swiss or Tyrolese or Roumanian. When we departed for our rest at 12 o'clock the ball was still in full swing and they told us that the early morning hours still witnessed the fun and frolic of men and women who became children again just for a night.

The last formal day of Congress, Saturday the 22nd August, was devoted to a general closing session in the morning at the Technical High School, in which the retiring president, Dr. Mybs, was given a hearty vote of thanks for his untiring efforts to make the 1908 Congress a success and Dr. Boirac, the new president, was welcomed. After a most enthusiastic cheering for Dr. Zamenhof and his wife, who were on the platform, and after deciding where to hold the next two congress, for 1909 and 1910, the "Fourth Congress" formally closed.

In the next and last part of my "Impressions of Dresden" I will tell of the "Festo de la Revuo" and of post-congress impressions of the beautiful city on the Elbe.

Digitized by Google

Resolutions passed by Pan-American Scientific Congress

Relative to Esperanto and its instruction by all American Governments.

The Pan-American Scientific Congress, which held its first session at Santiago de Chile in December and January, declared its approval of Esperanto as a neutral international language and recommended it for an important place in the programs for primary education in the American nations. It further recommended that, as the next meeting of the Congress is to be held in the United States, the government of this country should invite the nations of the entire world to send delegates for the express purpose of making an official world-adoption of Esperanto as the international language As concerns its scientific labors, the Pan-American Congress is, as its name indicates, the affair of America alone; but in a movement of such world-wide importance as the adoption of Esperanto, the obvious advantage of having special delegates from other parts of the world led to the recommendation by the Congress that the invitation be extended in the name of the United States government, which is the official patron of the next Congress.

The decision and recommendations of the Pan-American Scientific Congress will have great weight throughout the world, as it is by far the highest official body to recognize Esperanto. While the governments of Belgium, Saxony, Japan and the United States have taken some official notice of the language, and the municipalities of such cities as London and Paris have extended special courtesies to the author of the language, the action of this Congress, which is semi-governmental in character and had among its delegates the representatives of twenty nations as well as of most of the important universities of North and South America, will do much to confirm the growing popular feeling that Esperanto is no longer to be regarded as a project or a fad, but as a practical working language, which is soon to be the only recognized medium of communication between the various nations.

Following is a translation of the resolutions adopted by the Congress on January 4th:

"Considering, that the Esperanto language is a human blessing, practically used by thousands of people in all the civilized nations; and that it is a factor which aims toward the adoption of the ideals of human happiness and is therefore of special interest to America, the future field of action of the two great civilizations (Spanish-speaking and English speaking) which confront each other politically and commercially, the First Pan-American Scientific Congress recommends Esperanto as a neutral international language which deserves an important place in the programs of primary instruction of the American nations.

"Considering, that a neutral auxiliary international language is necessary, and observing that the idiom Esperanto fulfills the requirements, that it is already sufficiently widespread throughout the world, and that official propaganda alone is lacking:

"(1) The First Pan-American Scientific Congress decides to express to the American governments the pleasure with which it would view the call for a congress to which would come official representatives of all civilized countries, with the purpose of solving the problem of the adoption of a neutral international auxiliary idiom; and

"(2) It agrees to urge upon the government of the United States of North America that, under its grand auspices, this desire of the Scientific Congress may be effected."

The work of securing action on the subject of Esperanto was taken up by general agitation about a year ago, and carried to success on the floor of the Congress by the *Societo Patrina Esperantista de Ĉilo*, the Esperanto club of Valparaiso, and other organizations. Probably no other action of the Congress is so characteristically American. It is a case of early, prompt and vigorous recognition. That an international congress of scientists should take such decisive action on the subject at its first meeting speaks volumes for the proven practicability of Esperanto. Our Chilean friends are justly

Digitized by Google

proud of the results of their labor, and express their confidence in the early assembling of a World Congress under the auspices of the United States government. They have sent the following letter to the president of the Philippines Esperanto Association.

Kara Sinjoro:

Ni sendas al vi kopiojn el la komunikajo kaj el la proponoj aprobitaj de la Unua Tutamerika Scienca Kongreso, kiujn ni sendis al la Amerika Esperantista Asocio sciigante ĝin pri la plena triumfo kiun ni atingis je la supernomita Kongreso.

Ni kredas oportuna diri al vi ke, nun, la okazintajo prezentiĝas por puŝi niajn fratojn amerikajn al la efektivigo de la ŝarĝo, kiu estas sub ilia 1 lo.

Nia laboro estas plenumita. La esperantistaro Norda Ameriko havas nun la devon kronigi la triumfon.

Ni petas al vi publiki plene la proponojn akceptitajn ĉe la granda Kongreso.

Kore vin salutas,

IPOLITO K. KONTRERAS,
Vic-prezidanto de la S.P E. d'Chilo.

LOS RESULTADOS DEL CONGRESO

El 4.o Congreso Latino-Americano, Primero Pan-Americano, celebrado desde el 25 de Diciembre del año pasado hasta el 5 de Enero del presente, marcará en la historia del Esperanto una etapa de grande importancia.

Aunque se puede decir que los esperantistas chilenos nos encontrábamos solos, nos presentamos al torneo con la confianza que dá una causa noble y reconocidamente beneficiosa para toda la humanidad. Allí defendieron el Esperanto: el Presidente de nuestra C. E. A., Dr. E. Fraga; el Vice-Presidente, Dr. Gutiérrez; los señores Heuckens, C. Dassen de Buenos Aires, A. Guichard, Kontreras, Fábres, Biaut y Novoa. Todos ellos unidos firmemente como en las grandes ocasiones cuando peligra la independencia de la patria, se manifestaron llenos de fe y confianza en el éxito. Parecía que una hada generosa hubiera extendido sus brazos protectores sobre los que debían defender los fueros y los triunfos ya obtenidos por nuestra querida lengua.

Muchos delegados y miembros del Congreso, en conversaciones privadas, manifestaron sus simpatías por el Esperanto, entre ellos, el señor profesor Alvaro de Souza Sá Vianna, de Rio Janeiro.

En general, una atmósfera favorable á la lengua internacional respirábase en el Congreso y aunque no hubo una declaración franca y abierta á su favor, las mociones presentadas fueron aprobadas en globo, á causa del escaso tiempo de que se disponía.

He aquí las conclusiones de la tesis del Dr. E. Fraga, titulada: "Necesidad de la adopción de una lengua internacional para la difusión de las ciencias."

I. El Esperanto, como lengua internacional, se presta admirablemente para la mejor difusión de las ciencias;

II. La adopción del Esperanto en los congresos científicos internacionales y en las obras que tienen por objeto la difusión de los conocimientos humanos sería el mejor medio de propagar estos mismos conocimientos; y

III. El Esperanto, lengua internacional neutral, de fácil aprendizaje para los instruidos y para aquellos que no lo son, es el idioma por excelencia para procurar el intercambio de los productos del ingenio humano.

"El Primer Congreso Científico Pan-"Americano, reunido en Santiago de Chile, "acuerda:

"1.o Pedir á los Congresos Científicos "internacionales la adopció del Esperanto como lengua oficial;

"2.o Expresar el deseo de que los "hombres de ciencia escriban sus obras "en Esperanto, además de ser escritas "en su idioma patrio; y

"3.o Pedir á los gobiernos representa-"dos en este Congreso implantar el apren-"dizaje del Esperanto en las escuelas y "liceos."—*La Du Steloj.*

BIBLIOGRAFIO

FUNDAMENTAJ DOKUMENTOJ; N-roj 1, 4, 5 each Sm. 0.10. Esperantista Centra Oficejo, 51 rue de Clichy, Paris.

LA PARLAMENTISMA ILUZIO; (Laisant) Sm. 0.06—49 ruel de Bretagne, Paris III.

UNUA ESPERANTA LEGOLIBRO KUN GRAMATIKO kaj la Vortaro (Russian) N. Kabanov, Tverskaja 28, Moskvo.

HELPA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO (in Russian) N. Kabanov, Tverskaja 28, Moskvo.

Digitized by Google



Rivero Pasig
APUD MANILA





Digitized by Google

Raporto de la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco pri la 4ª Kongreso de Esperanto

Invitita sin riprezentigi en la Esperantista Kongreso en Dresden, la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco en Ĝenevo delegis al ĝi unu el siaj membroj por havi informojn pri la progresoj faritaj, dum la lastaj jaroj, de la internacia helpa lingvo. Tiu kvara kongreso kiu okazis de 16a ĝis 23a de Aŭgusto pruvis, ĉu per la nombro de siaj partoprenantoj, ĉu per la diversaj raportoj en ĝi prezentitaj, ke la Esperanta movado ne estas pajla fajro, sed progresas gravamaniene en multaj landoj kaj ke la aplikoj de la nova lingvo komencas sin disvastigi sur diversaj kampoj. Jam granda estas la nombro de specialaj gazetoj, de tradukoj de konataj aŭtoroj kaj eĉ de literaturaj verkoj originale skribitaj en Esperanto; tion oni konstatis per la speciala ekspozicio kiun oni organizis en Dresden okaze de la Kongreso.

La Dresden'a Kongreso kunigis ĉirkaŭ 1500 Esperantistojn apartenantajn al pli ol 31 diversaj nacioj. Kvankam sub la protektado de lia Moŝto, la Reĝo de Saksujo, la kongreso ne estis oficialo; la plejmulto el la kongresanoj estas simple partianoj de la nova lingvo aŭ riprezentantoj de Esperantistaj Grupoj kiuj ekzistas en multaj landoj. Tamen ni notu ke du registaroj sendis oficialan delegiton, S-ron D-ron Simura por Japanujo kaj S-ron Majoron Straub, militan kuraciston el la Ministrejo de Milito en Unuigitaj Statoj; tio estas konsiderata kiel sukceso, ĉar la tri unuaj kongresoj de Boulogne, Genève kaj Cambridge estis nur privataj.

La Kongreso estis dividata en diversaj fakoj, kiuj havas kiel celon la propagando de Esperanto sur ia speciala kampo; lingva fako, scienca fako, fako de la Ruĝa Kruco, k.t.p. Tiu lasta havis du kunsidojn kie ĉeestis trideko da personoj, ĉefe militaj kuracistoj kaj sinjorinoj, membroj de societoj de Ruĝa Kruco el diversaj landoj.

La Komitato konsistis el S-roj Generalo Sebert (Francujo), prezidanto; S-ro Generalmajoro Schmidt (Germanujo), vicprezidanto; D-ro Thalwitzer (Germanujo) kaj S-ro Leŭtenanto Bayol (Francujo).

Tiu lasta prezentis interesan raporton pri la kreo kaj la agado de la Franca Societo "Esperanto Ruĝa-Kruco"; tiu societo havas kiel honorajn geprezidantojn, S-rinon Pérouse, Prezidantinon de la Unuiĝo de Francaj Virinoj, S-ron Vic.-Admiralon Bayle, honoran Prezidanton de la Franca Sekcio de la Marista Esperantista ligo, S-ron Generalon Sebert, membron de la Instituto, Prezidanton de Konstanta Komitato de la Esperantaj Kongreso kaj kiel agadan Prezidanton S-ron Generalon Priou, ĝeneralan agenton de la propagandon de l'Unuiĝo de Francaj Virinoj. Tiu societo celas la propagandon en la Franca Ruĝa Kruco de la helplingvo Esperanto per kursoj kaj paroladoj.

S-ro Leŭtenanto Bayol montris ke la militaj cirkonstancoj povas krei, en la ambulancoj kaj en la hospitaloj, diversecon de lingvoj, kiu estos grava malfacileco por plenumi en ĉiuj okazoj la humanecan taskon kiun havas la Ruĝa Kruco. Li pensas ke la uzo de Esperanto per siaj kvalitoj de neŭtraleco, de facileco kaj de komuna kompreniĝo, povos en tiuj okazoj fari tre gravajn servojn kaj li dezirus vidi la kreadon en ĉiu lando de nacia societo Esperanto Ruĝa-Kruco, kies celos estus: 1ª prepari kaj certigi la interkompreniĝon en la ambulancoj kaj en la militaj hospitaloj: 2ª propagandi Esperanton inter ĉiuj personoj kiuj, okaze de milito, povos, ĉu doni zorgojn, ĉu ilin ricevi. Tiu deziro estas akceptata kaj komitato de tri membroj (Leŭtenanto Bayol, F-ino Monster el Kopenhago kaj D-ro Thalwitzer) estas nomata por sin ageme okupi pri la demando kaj fari raporton en la venonta Kongreso.

S-ro Leŭtenanto Bayol prezentas broŝureton, kies aŭtoro li estas, enhavantan sub formo de demandoj kaj respondoj en franca kaj Esperanta lingvoj, la frazojn plej necesajn al vundita soldato. Tiuj broŝuroj, presitaj je granda nombro da ekzempleroj, estas distinataj al soldatoj forirantaj al milito. Tiu malgranda gvidilo jam estas tradukita por la germanaj kaj italaj soldatoj kaj aperos tre baldaŭ en aliaj lingvoj: en dana, rusa, hispana, sveda, angla, bulgara, bohema, k.t.p.

S-ro D-ro Thalwitzer el Dresden faris interesan eksperimenton kiun ni ĉeestis plezure. S-ro Generalo Schmidt metis je

Digitized by Google

lia dispono sekcion da flegistoj de la Saksa Ruĝa Kruco. En dek lecionoj li sukcesis doni al ili sufiĉan instruon por ebligi al trideko da homoj kiuj sciis nur germanan lingvon obei al ordonoj donitaj Esperante kaj respondi al demandoj faritaj en tiu lingvo. Kondukitaj de D-ro Thalwitzer ni eniras grandan korton kie estis sekcio da flegistoj, kun bona sintenado en sia griza uniformo kun la brakbanto de la Ruĝa Kruco. Suboficiro donas en Esperanto kelkajn ordonojn kiuj estas obeataj militamaniere; poste kvar aŭ kvin flegistoj ŝajnigas sin vunditaj kaj kusiĝas tereŭ. D-ro Thalwitzer proksimiĝas al la unua, lin demandas pri lia stato kaj donas ordonojn por la bandaĝo kiu tie okazas tuj. La vundito estas poste metata sur homportilo kaj transportata sur ĉaro, ŝanĝita post kelkaj minutoj je veturilo, kaj povanta enhavi tri aŭ kvar vunditojn. Sama eksperimento fariĝas kelkfoje kaj nenia germana vorto estas dirita. S-ro Generalo Schmidt dankas D-ron Thalwitzer, ke li montris tiel klare ke Esperanto povas esti utile uzata en milito eĉ post tre mallonga tempo de instruado. Inter la ĉeestantoj ni rimarkis S-ron Generalon Ruhlemann (Germanujo), S-ron Generalon Sebert (Francujo), S-ron Majoron Straub, oficialan delegiton de la Unuigitaj Ŝtatoj, S-ron D-ron Kroita (Japanujo), kaj S-ron D-ron Zamenhof.

Kelkaj horoj sufiĉas por persono de meza instruado por kompreni la mekanismon de la lingvo Esperanto. Post kelkaj semajnoj da studado; eĉ sen profesoro, oni sukcesas legi facile tekston. Kelkaj monatoj sufiĉas por ĝin kompreni kaj flue paroli.

D-ro Zamenhof sukcesis krei lingvon facile lerneblan por ĉiuj, kaj kies elparolado estas ĉiam sama, se ĝi estas parolata de ruso, franco, anglo, germano aŭ japano.

Estas tre malfacile, aŭdante personon kiu parolas flue Esperanton, decidi kia estas ĝia nacia lingvo; estas unu el la fakoj kiuj plej surprizis min aŭdantan paroli riprezentantojn de pli ol tridek diversa nacioj. Konsekvenco estas ke tuj ili sin interkomprenas kun la plej granda facileco. Ni aldonu ke, pri la aŭdado, Esperanto tre memorigas lingvon hispanan aŭ italan. La frazo facile fluas kaj la orelo ne estas vundita de sonoj raŭkoj aŭ malagrablaj.

Por konvinki la publikon ke la lingvo Esperanto estas ne nur utila kaj praktika en la komerco aŭ en la internaciaj rilatoj, sed povas ankaŭ esti sukcese uzata por literaturo, granda drama prezentado estis organizata dum la Kongresa semajno en la granda Opera Domo de Dresden. "Ifigenio en Taŭrido" de Gœthe, tradukita en Esperantajn versojn de D-ro Zamenhof, estis ludata, antaŭ multnombra ĉeestantaro, de kelkaj el ĉefaj aktoroj el Berlin.

La eksperimento havis plenan sukceson se oni juĝas laŭ la aplaŭdadoj kaj realvokoj kiujn ricevis la aktoroj. Plej multe el la ĉeestantoj, konante Esperanton, povis sekvi la dramon, ne perdanta unu vorton: la aliaj personoj devis konfesi ke la aktoroj, tiel bone per sia rimarkinda ludado, kiel per sia senriproĉa elparolado, faris grandan impreson kaj ke la elsono kaj eleganteco de la frazoj povas konkuri sukcese kun multaj naciaj lingvoj.

Resume, mi opinias ke la uzado de Esperanto disvastiĝos, per la fakto mem de ĝia facila aplikado, sur multaj kampoj; ĉar la Ruĝa Kruco povas eltiri el ĝi verajn, profitojn, estus konsilinde atente sekvi la disvastiĝon de l'Esperanta movado kaj altiri pri tiu demando la atenton de la Asocioj de Ruĝa Kruco, en ciuj landoj, por ke tiu afero povu, bone studata, esti la temo de diskuto en la proksima internacia konferenco.

AD. MOYNIER.

INTERNACIA LIGO DE LA ESPERANTISTA PRESLABORISTARO

Sub la titolo: *Internacia Ligo de la Esperantista Preslaboristaro*, estas fondita amika unuiĝo de la Esperantistaj tipografiistoj, kompostmaŝinistoj, presistoj, bindistoj, kaj ĉiuj aliaj personoj, kiuj rilatas al la Presarto. Ĝia sidejo estas nun starigita en 7 Rue Rollin, Parizo, V.

La Ligo celadas: (1) Propagandi Esperanton inter ĉiuj samprofesianoj rilate al la Presarto; (2) Unuigi ia disajn sur la tuta terglobo Esperantistajn preslaboristojn el simila ofico aŭ okupo, kaj havigi al ili laŭeble kaj senpage, ĉiujn sciigojn ŭtilajn pri ilia profesio, kaj ĉefe helpi ilin en iliaj translokiĝoj eksterlanden.

Starigi specialan profesian internacian terminaron, kiu post ĝia plena ellaboro, estos senpage sendita al la partoprenantaj liganoj.

Ĉiujn korespondajojn, kotizajojn, mondonacojn, k. t. p., oni bonvolu rekte sendi al la ĝenerala sekretario Luis CARLOS, rue Rollin, 7., Parizo V. Francujo.

Digitized by Google

CIRKULERO No. 1, Februaro, 1909

INTERNACIA INSTITUTO DE ESPERANTO

POR LA INSTRUADO DE LA INTERNACIA LINGVO DE D-RO ZAMENHOF AL ĈIUJ POPOLOJ

PARIZO LONDONO BERLINO NOV-JORKO

HELPA KONSILANTARO

EMILE BOIRAC, rektoro de l'Dijona Universitato.
J. BOREL, direktoro de *Germana Esperantisto* en Berlino.
CARLO BOURLET, profesoro ce la Pariza Belarta Lernejo.
M. C. BUTLER, sekretario de la Londona Grupo Esperantista.
THEOPHILE CART, profesoro ce la Parizo Lernejo de Politikaj sciencoj.
TH. CEJKA, direktoro de la *Pedagogia Revuo.*
ROMANO FRENKEL, inspektoro de lernejoj en Enisejsk.
HECTOR HODLER, direktoro de *Esperanto.*
MARGARET JONES, direktorino de la Esperanto-lernejo en Liverpool.
MARECHAL, profesoro ce la Lingva Instituto en Leeds.
H. B MUDIE, prezidanto de U. E. A.
D-RO MYBS, presidanto de l'Germana Esperantista Societo
A. MILLIDGE, redaktoro de *British Esperantist.*
D-RO OSTROVSKI, fondinto de *Esperanto* en Jalta.
BENEDICT PAPOT, profesoro ce la Chautauqua Instituto.
D-RO R. DE SAUSSURE, direktoro de la *Scienca Oficejo* en Genevo.
GENERALO SEBERT, ano de l'Franca Akademio de Sciences

DIREKCIO

Vojaĝanta Direktanto - - - - - - EDMOND PRIVAT
Generala Sekretario - - - - - A. MILSOM (E. Ramo)
Centra Sekretarlejo - - 19, Pont d'Arve, Genevo (Svislando)
Kasbanko - - Bankverein Suisse, Genevo, 12, rue Petitot

CELO

La fondo de la *Instituto* por kreado de normalaj lernejoj kaj diplomoj estas aprobita de la kvara kongreso de Esperanto en Dresdeno.

La Instituto do celas prepari bonajn instruantojn de nia lingvo kaj por tio organizas specialajn kursojn (en Esperanto) kaj ekzamenojn en la grandaj urboj kaj ankaŭ speciale en la lokoj de la kongresoj, en antauaj au postaj semajnoj.

Por doni tujan laboron al la personoj, kiuj estas sukcesintaj tiujn ekzamenojn, la Instituto organizas kun ilia helpo praktikajn lernejojn de Esperanto en iliaj urboj, ie ajn en la mondo, simile kiel agis S-ro Berlitz por fremdlingvoj.

Por havigi lernantojn al tiuj lernejoj, la Instituto faras reklamadon kaj propagandon por Esperanto, kaj tre speciale en la lokoj, kie ankorau ne ekzistas naciaj au urbaj esperanto-societoj.

La Instituto laubezone sendas en tiajn lokojn bonan instruanton kaj propagandiston de nia lingvo por krei tie esperantomovadon.

La Instituto diskonigas kaj uzigas praktikajn metodojn por la instruado de Esperanto kaj tre speciale la *parolan* metodon. Gi zorgas por ĉie konservi kaj pligrandigi internacian unuecon en el parolado kaj stila klareco de la lingvo.

FUNKCIADO

La *Instituto* konsideras Esperanton kiel lingvon de nun praktikan kaj de iu ajn profiteblan por internaciaj rilatoj komercaj au aliaj. Pro tio ĝi mem funkciadas lau komerca bazo kaj devos baldau finance vivadi per si mem, ĉar ĝiaj servoj estas pagaj.

Por komenci, kaj precipe por krei ion kie ĝis nun nenio ekzistas, la Instituto bezonas sumojn da mono iom pli grandajn ol tiuj, kiujn jam oferdonis ĝiaj fondintoj. Pro tio monoferado estas de nun malfermata kaj oni petas la riĉajn samideanojn, ke ili sendu al la Banko de l'Instituto tiom, kiom ili povas, por helpi la aferon. Nomaro de la donacintoj estos publikigata.

Nomoj de l'diplomitoj, adresoj de la lernejoj, informoj kaj decidoj pri kursoj kaj ekzamenoj, regula raporto pri la agado de l'Instituto estos enpresataj en *Esperanto*, oficiala organo de l'Instituto kaj laubezone en aliaj gazetoj.

EKZAMENOJ

La Instituto organizas ekzamenojn por tri diversgradaj diplomoj (I, II, III).

I. ATESTO PRI STUDADO.

Skriba ekzameno: 1-e Letero unupaĝa pri donita temo el ĉiutaga vivo: 2-e unupaĝa rakonto pri esperantista temo: 3-e respondo al esperantaj demandoj pri facilaj aferoj: 4-e komentario pri donita teksto. Akirebla *koresponde* (enskribo: SM. 2).

II. ATESTO PRI KAPABLECO. Skriba Ekz.: 1-e skribverkajo pri esperantista temo: 2-e unupaĝa klarigo pri donita teksto.

Parola Ekz.: 1-e momenta interparolado esperante pri ĝeneralaj aferoj: 2-e komentario pri du tekstoj donitaj: 3-e respondo al esperantaj demandoj pri gramatiko. (Enskribo: SM. 5).

III. PROFESORA DIPLOMO. Skriba Ekz: 1-e skribverkajo pri esperantista temo: 2-e skribverkajo pri instrua, lingva au literatura temo.

Parola Ekz.: 1-e lego kaj klarigo pri donita teksto: 2-e respondo al gramatikaj

Digitized by Google

demandoj: 3-e interparolado pri la maniero instrui esperanton: 4-e leciono esperanta: klarigo pri gramatika au stila demando: 5-e respondo al demandoj pri historio kaj organizajoj de esperantismo. (Enskribo: Sm. 10).

De nun oni povas iam ajn provi la ekzamenon por n.o I (Atesto pri studado) sendante sian enskribon al la sekretariejo.

Pri Noj II kaj III oni sin turnu ankaŭ al la sekretariejo de l'Instituto, kiu informos pri lokoj kaj tempoj de ekzamenoj.

Se kandidato malsukcesas ekzamenon, li povas senpage provi duan fojon ne pli frue ol tri monatojn poste kaj ne pli malfrue ol dekok monatojn poste. Se li ne deziras reprovi, la duono de l'enskriba pago estas al li redonata.

INSTRUADO

La personoj, kiuj deziras preparigi por ekzamenoj au ial ajn perfektiĝadi en la kono de Esperanto, povas tuj sin turni, klarigante sian deziron, al la centra sekretariejo de l'Instituto (19, Pont-d'Arve, Genéve).

La Instituto havigos al ili instruantojn aŭ ekzercokorektantojn en iliaj urboj au mem instruos ilin per korespondado.

KONGRESAJ KURSOJ

La Instituto organizos serion da kursoj tute en Esperanto en la urbo de nia venonta kongreso. Ili okazos dum dek tagoj antau la kongreso. Jam 6-7 eminentuloj diverslandaj promesis partopreni kaj instruados aŭ parolados pri: *instruaj metodoj, propagandaj metodoj, esperanta stilo kaj verkado, sintakso, generala lingvoscienco, historio de esperanto*, k. t. p.

Profitos tiujn kursojn speciale la esperanto-instruantoj, sed ankau ĉiuj, kiuj ŝatas aŭdi bonajn kaj instruajn paroladojn de niaj plej bonaj esperantistoj. Okazos ĉe la fino ekzamena kunzido por diplomoj II kaj III. Disdono de la diplomoj al sukcesintaj kandidatoj okazos ĉe solena kunveno dum la kongresa semajno. Ciuj esperantistoj, kiuj aprobas la organizon de tiuj kursoj, estas petataj skribi al la sekretariejo de l'Instituto, sciigante sian deziron partopreni aŭ ricevi pluajn sciigojn.

Kiamaniere Helpi Al La Lingva Komitato?

Ĉu la naciaj societoj, la grupoj, la izolaj Esperantistoj helpus al la Lingva Komitato aŭ al la Akademio, diskutante pri teoriaj reformoj en por tio speciale starigitaj lingvaj komisioj,—kiel proponis iu samideano?

Ne, certe ne! Tiel, kontraŭe, ili malplifaciligus ofte la taskon de nia lingvaj institucioj.

Sed... ĉu Esperantistoj, kiuj interesiĝas pri lingvaj demandoj, neniel povas kontentigi tian inklinon? Ĉu ili devos necese resti senagaj?

Unue mi rimarkas, ke, efective, ili en ĉiu grupoj estas tre malmultaj. La granda, grandega plimulto de la Esperantistoj, la pli fervoraj, la pli agemaj konsideras, ke la grava afero ne estas la filologia demando, sed la disvastigado de la lingvo. Pravaj ili estas, opiniante, ke la "progreso" ne konsistas en ĉiam duba kaj senfina teoria plibonigado, sed en tuja, ĉiam pli ĝenerala uzado de la nuna tute taŭga interkomprenilo.

Kelkaj ekzistas tamen, tre fidelaj, tre sinceraj samideanoj, kiuj prefere direktas sian atenton al la lingvo mem, ol al ĝia propagando, kaj volonte alportus sian kunlaboradon al la Lingva Komitato. Ĉu la eblon fari tion ili ne havas? Kaj kiamaniere, se ne diskutante pri reformoj?

Ho, tre simple! Ili uzu, en filologia demando, filologian metodon;

Ili kolektu la novajn vortojn, la novajn radikojn, kiujn ili renkontas ĉe la plej bonaj verkistoj;

ili komparu tiujn vortojn kun aliaj samsencaj uzitaj de aliaj verkistoj;

ordigu tiujn vortojn laŭ kritika metodo, aldonante rimarkojn pri ilia deveno, pri ilia taŭgeco;

traduku ilin zorge en diversajn naciajn lingvojn;

ili komparu la diversajn naci-esperantajn vortarojn;

la samon ili faru por la diversaj dirmanieroj kaj sintaksaj esprimoj;

ili studu specialan verkon de D-ro Zamenhof, de Kabe, k.c. el lingva vid punkto: vortfarado, uzo de l'artikolo, de l'adjektivo, de la kazoj, de la tpojm, de l'adverboj, de la prepozicioj, k.t.p.

Ne mankas interesplena laboro, kiu samtempe estos utila al ĉiuj, ĉar per tia studado oni baldaŭ konvinkiĝos, ke mirinda, —pli mirinda filologie ol multaj samideanoj opinias,—estas la ilo, kiun donis al ni D-ro Zamenhoj.

Poste, tiujn laborojn, zorge redaktitajn, klare skribitajn; oni sendu al la Lingva Komitato.

Oni ne dubu, ke kun danko ĝi akceptos tian fruktoriĉan kunlaboradon!

Th. Cart.

Digitized by Google

Esperanto-Konsulo: S-RO I. ARNALOT, Hotel de France, Manila.

The Philippine Esperanto Association


FOUNDED, JULY 1907

HON. PRESIDENT
Dr. L. L. Zamenhof, (Warsaw)

PRESIDENT
Dr. H. W. Yemans, M.D., U.S.A.

VICE-PRESIDENT
Mr. Luis Llanso

EXECUTIVE COMMITTEE
The President, E. A. McClellan, F. V. Freire, Benito Urrutia, and the Sec.-Treas.



Digitized by Google

Addresses of Esperanto Gazettes

and their subscription price per annum in International Money Unit—₱1.000=1.026 Sm.

* Monthly. ** Fortnightly. † Entirely in Esperanto. || Esperanto and National

SPECIALAJ

"DIA REGNO" * † Sm. 0.90
Paul Hubner Friedridh-Wilhelmstr 66
Mulheim a. Rh., Germany.

"ESPERANTO" ** † Sm. 1.20
8, rue Bovy-Lysberg, Geneva, Switzerland.

"ESPERO KATOLIKA" * † Sm. 2.00
23, Rue Joubert, Paris, France.

"ESPERANTA LIGILO" * † Sm. 1.20
(en reliefpunktoj por blinduloj)
12, rue Soufflot, Paris (V) France.

Sm. 2.06
"ESPERANTA INTERNACIA REVUO" * †
Ulloi-út 59, Budapest, Hungary.

"ESPERO PACIFISTA" * † Sm. 2.00
26, rue de Chartres,
Neuilly-sur-Seine, France.

"EUROPA KRISTANA CELADO" * † Sm. 0.75
S-ro Ch. Briquet, rue de la Cité,
Geneva, Switzerland.

"FLUGILA STELO" * † Sm. 1.04
P-ro Schneeberger,
Lusslingen, Switzerland.

"FRATECO" * † Sm. 0.30
J. Luneman, van der Neerstraat 40,
Gravenhage, Holland.

"INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO" † Sm. 1.80
en Bystrice-Hostyn, Moravia, Austria.

'INTERNACIA SCIENCA REVUO" * † Sm. 2.80
8, rue Bovy-Lysberg, Geneva, Switzerland.

"INTERNACIA SOCIA REVUO" ** † Sm. 2.40
S-ro R. Louis,
45, rue de Saintonge, Paris (III) France.

"JUNA ESPERANTISTO" * † Sm. 1.00
33, rue Lacepede, Paris, France.

"LA BELA MONDO" *
Bismarkplatz 12 Dresden, Germany.

"LA REVUO" * † Sm. 2.80
76, Boulevard St-Germain, Paris, France.

"LIBERA PENSO" * † Sm. 1.00
S-ro R. Deshays, Sens, France.

"LINGVO INTERNACIA" * † Sm. 3.00
33, rue Lacepede, Paris, France.

Sm. 2.00
"OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA" * †
51, Rue de Clichy, Paris, France.

"OFICIALA BULTENO DE LA U.E.A." * ||
8 rue Bovy-Lysberg, Geneva, Switzerland.

"TRA LA FILATELIO" * † Sm. 0.80
S-ro J. Fize, Beziers, France.

"VOCHO DE KURACISTOJ" * † Sm. 1.00
D-ro Stefan Mikolajski,
Sniadekich, 6, Lwow, Austro-Galicia.

"LA SPRITULO" * † Sm. 1.20
Richard Bresch,
Kornerstr. 31, Leipzig, Germany.

ALĜERIO

"AFRIKA ESPERANTISTO" * ||
5, rue du Marché, Alĝiers, Algeria.

AUSTRALIO

Sm. 1.50
"THE AUSTRALIAN ESPERANTIST" * ||
S-ro R. Dossor, Bridge str., Benalla,
Victoria, Australia.

AUSTRIO

"BOHEMIA ESPERANTISTO" * || Sm. 1.70
J. Iglauer, Praha III 495, Austria.

Sm. 1.00
"ĈASOPIS ĈESKYCH ESPERANTISTO" ||
Praha, Bohemia, Aŭstria.

"INFORMAJ RAPORTOJ" * || Sm. 1.00
K. F. Ahlgrimm, Bandgasse, 31,
Wien VII 1, Austria.

BELGUJO

"BELGA ESPERANTISTO" * || Sm. 1.80
20 Vondelstraat, Antwerpen, Belgium.

BULGARUJO

"LUMO" * || Sm. 2.00
V. Tirnovo, Bulgaria.

Digitized by Google

BRAZILO

"Brazila Revuo Esperantisto" * † Sm. 2.40
S-roj M. Piedade & Co.,
Ruo da Asamblea, Rio-de-Janeiro.

BRITUJO

'The British Esperantist" * || Sm. 1.50
133-136, High Holborn, London, W.C.

"La Esperanta Instruisto" * || Sm. 1.00
17 St. Stephen's Sq., Bayswater, London.

'La Vagabondo" * ||
16 Westbourne Gardens
Hove, Sussex, England.

La Londona Gazeto" * ||
C.-A. Fairman, 70, Romola-road,
Herne Hill, London S. E.

ČILO

'Čilo Esperantista" * || Sm. 1.00
Casilla 1989, Santiago, Chile.

'La Du Steloj" * || Sm. 2.00
Casilla 728, Santiago de Chile.

"Esperantaj Skribajoj" * || Sm. 0.40
Casilla 1284, Santiago, Chile.

DANUJO

"Dana Esperantisto" * || Sm. 1.10
Gyldenlovesgade 16,
Copenhagen, K, Denmark.

FILIPINA INSULARO

"Filipina Esperantisto" * || Sm. 2.00
P. O. Box, 326, Manila.

FINNLANDO

"Finna Esperantisto" * || Sm. 1.20
Helsingfors, Finland.

FRANCUJO

"Franca Esperantisto" * || Sm. 1.60
46 boulevard Magenta, Paris, France.

"Paris-Esperanto" * || Sm. 0,60
S-ro V. Chaussegros,
3, Place Jussieu, Paris, France.

"Lorena Esperantisto"
Esperantista Grupo en Nancy, France.

"Le Monde Esperantiste" * || Sm. 0.80
3, rue Sophie-Germain, Paris, France.

"Norda Gazeto" * || Sm. 0.40
E. Deligny, boulevard Vouban.
Saint-Omer, France.

"La Normanda Stelo" Sm. 1.00
Liébard kaj Leroux,
14, rue de la Vicomté, Rouen, France.

"Sarta Stelo" * || Sm. 0.40
rue Scarron, 14, Le Mans, France.

"L'Informilo" (jarkvarone)
8 rue de Rome, Calais, France.

"Le Phare Sm. 1.60
Stenographique et Esperantiste" || *
60, Rue des Carmes, Rouen, France.

GERMANUJO

"Germana Esperantisto" * || Sm. 1.50
95, Prinzenstrasse, Berlin, Germany.

Sm. 2.00
"Germana Esperanto-Gazeto" * ||
S-ro H. Wuttke, Pionierstrasse, 21,
Magdeburg, Germany.

"Eho Esperantista" * ||
Wilhelmstrasse 29, Berlin, Germany.

"La Esperantisto" * ||
Talstrasse 27, Leipzig, Germany.

HISPANUJO

"La Suno Hispana" * || Sm. 1.20
S-ro A. Jimenez Loira,
Avellanas, 11, Valencia, Spain.

"Stelo Kataluna" * ||
Rambla S. Isidro, 30,
Igualado, Barcelona, Spain.

"Tutmonda Espero" * || Sm 1.60
Paradis, 12, pral., Barcelona, Spain.

HOLANDO

"La Holanda Pioniro" * || Sm. 1.25
Singel, 386, Amsterdam, Holland.

HUNGARUJO

"La Verda Standardo" * || Sm. 1.66
Ulloi-út 59. IV, 8, Budapest.

"Sciganto"
Johano Medgyesi,
Alpar u., 8, Budapest VII, Hungary.

"La Pioniro" * †
VI Nagymezo-u 12, 1-16
Budapest, Hungary.

ITALUJO

"Notizie Esperantiste" * ||
6, via S.-Agostino, Palermo, Italy.

"Roma Esperantisto" * || Sm. 1.20
198, Babuino, Rome, Italy.

JAPANUJO

"Japana Esperantisto" * || Sm. 1.60
3, Čome, Jurakčo,
Kojimačik, Tokio, Japan.

Digitized by Google

JAPANUJO

"SAMIDEANO ĈIUMONATA" * † Sm. 2.75
S-ro M. Hikosaka,
33 Abekamashi Asakusa, Tokio, Japan.

MALGRAND-AZIO

"GREKLINGVA ESPERANTO" * || Sm. 1.20
Samosa Esperantista Societo
Samos, Asia Minor.

MEKSIKLANDO

"MEKSIKA REVUO" * || Sm. 1.00
Cocheras, num. 2, Mexico, D. F.

"VERDA STELO" * || Sm. 1.00
D-ro A. Vargas,
3a del Reloj, numero 12, Mexico, D. F.

"ESPERANTA GAZETO" * || Sm. 0.75
Calle Morelos, 995, Guadalajara, Mexico.

"ESPERANTA MEKSIKA" * || Sm. 1.25
Str. Perpetua 5, Mexico.

NORVEGUJO

"NORVEGA ESP. GAZETO" * || Sm. 1.20
Sondregate, 4 IV Kristianio, Norway.

PERUO

"ANTAUEN ESPERANTISTOJ" * || Sm. 1.20
Apartado 927, Lima, Peru.

POLUJO

"POLA ESPERANTISTO" * || Sm. 2.00
Hoza No. 40, m. 8, Varsovio, Poland.

PORTUGALUJO

"PORTUGALA REVUO" * ||
215 Rua do Rosario, Porto, Portugal.

RUMANUJO Sm. 1.20

"RUMENA GAZETO ESPERANTISTA" * ||
Soc. Esperantista, Galatzo, Roumenia.

"RUMENA ESPERANTISTO" * || Sm. 2.00
5, Str. I. C. Bratianu, Bukarest, Roumenia.

RUSUJO

"ESPERO" * || (Vjestnik Znania,) Sm. 4.00
Nevskij pr., d. No. 147,
St. Peterburg, Russia.

"ESTLANDA ESPERANTISTO" * || Sm. 1.60
Weike Kalamaja uul. 7, k. 2, Revel, Russia.

"LA ONDO DE ESPERANTO" * || Sm. 1.06
28 Tverskaja, Moskvo, Russia.

SVEDUJO

"ESPERANTISTEN" * || Sm. 1.40
37, Surbrunnsgatan, Stockholm, Sweden.

SVISUJO

"SVISA ESPERO" * || Sm. 1.20
8, rue Bovy Lysberg, Geneve, Switzerland.

USONO

"AMERIKA ESPERANTISTO" * || Sm. 2.00
186, Fortieth street, Chicago, U. S.

REMOVAL

The Esperantista Klubo "Abelujo" has removed to larger quarters situated at 85 Calle Gastambide. The monthly dues are now ₱2.50. The Secretary, Mr. Arnalot of the Hotel de France, will be pleased to give full particulars regarding the Club and classes.

By means of the Ĉekbanko Esperantista the Secretary will willingly transmit small sums to any part of the world in payment of subscriptions to Esperanto periodicals and publications. Address: W. H. Case, Secretary P.E.A., P. O. Box 326, Manila.

Renewals received since Dec.—P. E. A. Nos. 49, 65, 219, 250, 254, 278, 807 858, 367, 379, 382, 392, 393, 430, 451, 452, 453, 454, 457, 469, 476, 479, 494, 509, 519, 521, 522, 524, 530, 536, 546, 547, 549, 550, 553, 556, 564, 568, 599.

Subscribe to the fortnightly gazette "Esperanto!"

THE OFFICIAL ORGAN OF THE : : :
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

The Universala Esperanto-Asocio, with head offices at Geneva, is the recognized bond of Esperantists of all lands; a powerful combination for universal propaganda effort and practical utility. Every Esperantist should at least subscribe to its official organ "Esperanto."

Annual Subscription to "Esperanto" - - -	₱1.60
Membership card in U. E.-A. - - - - - -	.36
Badge U. E.-A. - - - - - - - - -	.30
Jarlibro of Delegates, etc., U. E.-A. - - -	.25

Subscriptions forwarded by W. H. Case, Box 326, or by the U. E.-A. Delegate, Mr. I. Arnalot. Hotel de France.

Digitized by Google

LA PAZ Y BUEN VIAJE

Fabrica de Cigarros, Cigarrillos y Picadura

: : CALLE ASUNCION No. 111, SAN NICOLAS : :

PREMIADA CON MEDALLA DE ORO EN LA EXPOSICION DE SAN LUIS : : :

FUNDADA DESDE EL AÑO 1883

Productos selectos y renombrados; empleando solamente en su elaboracion HOJAS ESCOGIDAS de las mejores Vegas de ISABELA y CAGAYAN : : : : : : :

PROBAD Y OS CONVENCEREIS

"LA COPA"

MORIONES 173, TONDO

DESTILERIA ACREDITADA EN EL ORIENTE

Se expenden en este establecimiento

ANISADOS

CARABANCHEL

GINEBRA

y otros vinos del pais en precios muy reducidos.

A. ZIALCITA,
Propietario

HOTEL DE FRANCE

ESCOLTA--MANILA

CENTRAL POSITION, GOOD TABLE AND ALL MODERN CONVENIENCES : : :

Correspondence in English, Spanish, French and Esperanto.

A LINE OF LATE FICTION

REDUCED FROM
₱3.00 TO ₱2.00

SEND FOR OUR LIST

This list includes the latest novels by the best known authors. New titles are received by each mail.

JUST RECEIVED
CONSIGNMENT OF THE

AMERICAN ESPERANTO BOOK

THE TEXT BOOK THAT
IS MOST EXTENSIVELY
USED IN THE STATES

PRICE ₱2.00 - - - - - - CLOTH

AMERICAN BOOK AND NEWS CO.
MANILA

Digitized by Google